
# La kapdoloro !



Renato suferas pro kapdoloregο.




Kiam li matene ellitiĝas,
li havas kapdoloron.



En la trafikŝtopadoj
irante al sia oficejo,
li havas kapdoloron.

Dum la tuta mateno,
li havas kapdoloron.

Tagmeze, li tagmanĝas sole,
nepre, li ne povas partopreni en
la konversacioj de siaj kolegoj,
li suferas kapdoloron !




Posttagmeze, li provas forgesi
ke li havas kapdoloron.

Li rehejmeniras frue
por provi enlitiĝi kaj iom dormi.

Sed la nokto trovas lin vekita
pro lia kapdoloro...

Estas dek jaroj ke tio daŭras kaj post esti konsultinta plurajn kuracistojn...




...Renato interkonsentas pri rendevuo kun specialisto.



La viro pasigas la kapon de
Renato en la tomografo
kaj donas sian verdikton :


-Renato, mi havas du novaĵojn;
unu bona kaj unu malbona...
La bona estas ke ni trovis
la originon de via malbono.

-La malbona, ĝuste estas la origino de via malbono. Fakte viaj testikoj premas la malsupron de via dorso.



La lumbaj vertebroj reage pinĉas la spinan nervon kiu supreniras laŭ la kolumno ĝis la kapo, kaŭzas konstantan iriton de la cerbo, pro tio viajn kronikajn kapdolorojn.

-Be !... Kaj kion ni povas fari por tion ripari, Doktoro ?




-Nur du eblecojn, Renato :

Distranĉi al vi la testikojn...

aŭ

Lasi vin vivi kun via doloro.

Kelkaj pripensaj momentoj sufiĉas al Renato por sin decidi



Li vere tro suferas kapdoloron.

– Ni distranĉas, doktoro !


Tri tagoj suficîs por ke Renato,
resanigita de la operacio,
foriras el la kliniko.

Nova mondo disvastiĝas antaŭ liaj nekredemaj okuloj.



Liaj migrenoj forlasis lin,
liaj tempioj ne plu batadas,
liaj ideoj estas klaraj,
la homoj ridetas al li
kaj li finfine ridetas al ili !



# Tamen, Renato perdis siajn testikojn...

Pasante antaŭ tajlora vendejo por viroj, li decidas por tion festi, aĉeti por si novan almezuritan kostumon, kaj puŝas la pordon de la vendejo

- Saluton sinjoro tajloro, mi ŝatus aĉeti al vi almezuritan kostumon


- Neniu problemo sinjoro !
Mi proponas al vi ĉi tiun jakon en 54 kaj ĉi tiun pantalonon en 46 kiuj perfekte taŭgos al vi.



Iom mirigita de tia juĝakreco.


Renato surmetas la kompleton kaj necesas konstati ke ĝi taŭge alĝustiĝas al li.

—Vere sinjoro, mi estas impresita ! Kiel vi kapablas diveni mian talion tiel precize ?




— La ekvido de la spertulo, sinjoro. Mi praktikas ekde pli ol dudek jaroj.

Entuziasmigita, Renato decidas kompletigi siajn aĉetojn pagante al si ŝikan kalsonon.




-Vi tute pravas, Sinjoro, mi proponas al vi ĉi tiun kvadratitan modelon en talio 42.

- Pardonu, sinjoro, sed ĉifoje vi eraras. Mi surmetas nur talion 40.

- Kredu la ekvidon de la spertulo, sinjoro. Pri kalsono, vi almezuras je 42.


Renato insistas :
- Vee malpravigi vin, sinjoro,
sed mi surmetas la talion 40
ekde almenaŭ 10 jaroj !

-Estas kiel vi volas, sinjoro, sed mi devas averti vin :

surmetante la talion 40, viaj testikoj premos la malsupron de via dorso kaj viaj lumbaj vertebroj reage pinĉos la spinan nervon kiu, siavice, donos al vi kapdoloron...